

**ĈU ESTAS VI, KIU DEVAS VENI, AŬ NI DEVAS ATENDI ALIAN?**  
**- Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Mateo 11, 2-11**

**En tiu tempo Johano estis en malliberejo, sed li aŭdis pri la faroj de Kristo. Tiam li sendis kelkajn el siaj disĉiploj, por demandi lin: «Ĉu estas Vi, kiu devas veni, aŭ ĉu ni devas atendi alian?». Jesuo respondis: «Iru kaj sciigu al Johano tion, kion vi aŭdas kaj vidas: blinduloj vidas, lamuloj iras piede, lepruloj estas purigataj, surduloj aŭdas, mortintoj levigās, kaj al malriĉuloj estas anoncata la evangelio. Beata estas tiu, kiu fidis al mi».**

**Kiam ili reiris al Johano, Jesuo komencis paroli al la homamasoj pri li: «Por kion vidi vi iris en la dezerton? Ĉu junkon skuatan de la vento? Kion do? Ĉu homon lukse vestitan? Sed tiuj, kiuj portas luksajn vestojn, troviĝas en la palacoj de la reĝoj. Kion vi volis vidi? Ĉu profeton? Jes, mi diras al vi, eĉ pli ol profeton. Li estas tiu, pri kiu estas skribite: "Jen mi sendas antaŭ vi mian heroldon, kiu preparos al vi la vojon".**

**Vere mi diras al vi: Inter naskitoj de virinoj ne estis pli granda ol Johano, la Baptisto. Tamen la plej malgranda en la regno de la ĉielo estas pli granda ol li».**

La hodiaŭa evangelio reportas nin al la profunda krizo en kiun falis Johano la Baptisto. Li, kiu eĉ rekoninte en Jesuo la Mesion, komencas nun tion pridubi. Kial? Johano la Baptisto estis la heredanto de iu spiritualeco, de iu tradicio, de iu religieco, kiuj esperis en popolo de justuloj, kiel profetis profeto Jesaja: *via popolo estos tute de justuloj.*

Kaj li konsterniĝas pro la konduto de Jesuo kiu asertas ne esti veninta por alvoki la justulojn, sed la pekulojn. Li prezentis mesion kiu estos puninta pekulojn kaj senkredulojn kaj li aŭdas diri ke Jesuo ne anoncas la punon de Dio, sed la amon de Dio ĝuste por tiaj kategorioj.

Tiam Johano kriziĝas kaj sendas al li ultimaton kiu tre similas ekskomunikon. „*Ĉu estas Vi, kiu devas veni, aŭ ĉu ni devas atendi alian?*“. Jesuo en sia respondo listigas la agadojn de la mesio tiaj kiaj ili estis priskribitaj en la libro de profeto Jesaja, kaj temas pri ses agadoj, rilataj al la ses tagoj de la kreado, per kiuj oni komunikas vivon al tiuj kiuj vivon ne havas.

*„Blinduloj vidas, lamuloj iras piede, lepruloj estas purigataj, surduloj aŭdas, mortintoj leviĝas, kaj al malriĉuloj estas anoncata la evangelio.“*, sed Jesuo cenzuras la lastan el la agadoj de la mesio, la venĝon kontraŭ la paganoj, la venĝon kontraŭ la regantoj.

Jesuo ne parolas pri venĝoj, sed parolas nur pri amo de Dio. Jesuo ne prezentas la punon de Dio, sed prezentas vojon de Dio, tiu de la amo, por bone kreskigi ĉiujn personojn. Kaj estas admono de Jesuo, kiu estas pli aktuala ol iam ajn *“Beata estas tiu, kiu fidis al mi.”*

Kion tio signifas? La tiutempaj personoj kompreneble tremis je la bildo de Dio prezentita de Johano la Baptisto, Dio kiu punas, Dio kiu riproĉas, Dio kiu ofendiĝas. Sed temis pri la Dio kiun ili konis, pro kio ili tremis, lin timis, sed ne skandaliĝis. Male ili skandaliĝas pro la Dio de Jesuo.

La samaj personoj kiuj ne skandaliĝis aŭdante paroli pri iu Dio terura en liaj venĝoj kaj en liaj punoj, estas ĝuste tiuj kiuj skandaliĝas aŭdante la anoncon de Jesuo pri iu Dio kiu amas ĉiujn ajn sendepende de ilia konduto kaj de ilia teniĝo. Tio al personoj piaj, al personoj religiaj, hodiaŭ kiel tiam, kaŭzas ĉiam konfuzon. Estas netolereble, ne akceptebla ke Dio sian amon verŝu sur la homojn sendepende de iliaj meritoj aŭ de ilia konduto.

Bone, post kiam la disĉiploj de Johano foriris, Jesuo laŭdas Johanon antaŭ la homamasoj. Kaj tion faras per du gravaj komparoj. Li diras: *“Por kion vidi vi iris en la dezerton?”* Temas pri Johano. *“Ĉu junkon skuatan de la vento?”*, nome oportunisto kiu kliniĝas al ĉiu povovento, kiu sin metas je la servo de ĉiuj potenculoj.

*Kion do? Ĉu homon lukse vestitan? Sed tiuj, kiuj portas luksajn vestojn, troviĝas en la palacoj de la reĝoj.”* Jesuo do estas avertanta siajn

aŭskultantojn, Johano estas la sendito de Dio, sed la senditoj ne povas esti oportunistoj, ĉiam surĉevale kun la laŭvica potenculo. La senditoj de Dio ne povas esti korteganoj, vivi en la palaco, manĝi ĉe sama tablo kun la potenculo, sed ili devas esti tiuj kiuj denoncas la misfarojn de la potenculo.

Kaj poste Jesuo konkludas dirante ke: *“Inter naskitoj de virinoj ne estis pli granda ol Johano, la Baptisto. Tamen la plej malgranda en la regno de la ĉielo estas pli granda ol li.”*

Kion volas diri Jesuo per tiu esprimo? Samkiel Moseo ne povis eniri en la promesitan landon ankaŭ se li gvidis la popolon, tiel Johano la Baptisto anoncis la Regnon de Dio, sed ne povis ĝin eniri ĉar li estis mortigita. Jen en tio la grandeco de Johano la Baptisto, sed tiuj de la Regno estos eĉ pli grandaj ol Johano, la sendito de Dio.